


Numero: 299.
Aprilo 2017.

25-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Kaprica printempo

Onidire la aprilo estas kaprica monato. En iu tago suno brilas kaj en la alia preskaŭ frostas, eĉ neĝas.

Kompreneble nun mi parolas pri Hungario, Mezeŭropo. Certe en la aliaj partoj de la terglobo estas tute alia vetero.

Ĉu la vetero influas la animon de la homoj? Mi estas konvinkiginta, jes.

Ankaŭ ni hungaroj estas kapricaj, kiel la aprilo. Ni rapide ekbruliĝas kaj en la alia momento ni fariĝas frostaj.

La vetero estas paralela kun la diversnaciaj homoj.

Se vi opinias aliel, trankvile diskutadu kun mi. Skribu, kiel vi pensas pri ĝi.

En Karpata-baseno estas kvar sezonoj: printempo, somero, aŭtuno kaj vintro.

Ankaŭ mi ofte sentas, kiel influas mian animo kaj sanstaton la vetero. Se mi mezuras mian sangopremon en malbona vetero ĝi estas ĉiam pli alta, ol en sunriĉa vetero. Ankaŭ mia humoro ŝanĝiĝas, se subite alvenas veterofronto kaj el la bela vetero fariĝas malbona.

Laŭ mi la vetero influas ankaŭ la politikon. Eble jam naskiĝis malbona, eĉ danĝera decido, kiam sur la ĉielo flugis nigraj nuboj.

La homo estas la parto de la naturo. Ni estas nur etaj punktoj rilate al la senfina universo. Malgraŭ tio la homo en iu tago la homo vizitos forajn planedojn kaj galaksiojn pri kiuj nun ni nur revadas.

Kiom interese vetero povas ŝanĝigi la humoron de la homo kaj ĝi influas nin. De tio dependas ofte, kiel ni agas kaj decidas.

Kio okazos, se en iu tago ni forlasos nian hejmon la terglobon, kaj ni vivos en kosmaj, artefaritaj planedoj aŭ ni faros koloniojn ekzemple sur la planedo Marso.

Kio influos nin tie? Ĉu ankaŭ la planedo Marso estos sezonoj, ekzemple kaprica printempo? Kia estos la tieaj sezonoj? Ĉu ili similas al la teraj?

Estus bone scii. Nur nia fantazio povas helpi. Se ni fermas niajn okulojn kaj ni koncentras pri tiuj foraj planedoj, tiam eble nia inago flugigas en la kosmon kaj antaŭ ni ekaperos belega mondo.

— Redaktanto —



Knabeto

— Kial vi ploras, knabeto?

— Mi perdis mian tradukmaŝinon, oĉjo.

— Ĉu vi havas tradukmaŝinon?

— Jes.

— De kie vi akiris tiun ĉi tradukmaŝinon?

— Mi ricevis ĝin de mia baptopatro okaze de mia naskiĝtago. Per ĝi mi povis traduki ĉiom da ekzistantan lingvon sur la terglobo.

— Ĉu? Interese. Ĉu ekzistas tia tradukmaŝino. Mi ankoraŭ ne aŭdis pri ĝi. Infanaĝe mi lernis fremdajn lingvojn en la lernejo.

— Ĉu lerni fremdajn lingvojn? Tio estas laciga kaj enuiga. Mi prefere uzas tradukmaŝinon. Sed ĝi perdiĝis. Kie mi serĉu ĝin?

— Mi povus helpi al vi.

— Ĉu? Sed kiel? Ĉu vi scias, kie estas mia tradukmaŝino?

— Tion mi ne scias. Sed anstataŭ ĝi mi scias pli bonan rimedon.

— Tion mi ne kredas. Anstataŭ tradukmaŝino ne ekzistas pli bona rimedo. Per ĝi mi povis traduki ĉiom da lingvoj, eĉ la plej strangajn. Diru al mi, oĉjo, kiel vi povas helpi al mi. Mi timas, ke vi trompas min por ke mi trankviliĝu.

— KREDU min! Mia rimedo efektive estas grandioza. Ĝi estas pli bona, ol via tradukmaŝino.

— Tion mi ne kredas. Mi petadas, malkaŝu, kio ĝi estas? Diru al mi, ĉu ĝi estas granda maŝino aŭ eta. La mia estis malgranda. Ĝi estis poŝotradukilo.

— Ĝi ne estas objekto. Ĉi tiu tradukmaŝino loĝas en la homa cerbo kaj koro.

— Ĉu? Kiel ĝi povas esti? Mi ne kredas vin, oĉjo.

— Ĝi estas grandioza lingvo.

— Ĉu lingvo? Mi ne volas lerni denove novan lingvon.

— Ĝi estas facile ellernebla. Ĝia gramatiko estas simpla kaj logika...

— Ĝi ne interesas min. Mi bezonas tradukmaŝinon.

— Almenaŭ aŭskultu min, knabeto!

— Vi trompis min. Vi deziras, ke mi lernu lingvon. Tion mi ne volas. Mi abomenas la lingvolernadon.

— Sed ĝi estas bonega lingvo. Ĝi estas pli bona kaj utila ol via tradukmaŝino.

— Ne! Ne, mi ne volas ĝin.

— Nun kien vi kuras? Haltu, knabeto. Ĝi estas pli ol lingvo. Ĝi estas Esperanto.

— Ŝaŝa —



Noveleto

La malhelo

— Apáti Kovács Béla —



Subite fariĝis malhelo. Antaŭ nelonge ankoraŭ Suno brilis kaj la sunradioj orumis la pejzaĝon. Ĉio estis fantaste belega. Kvazaŭ pentristo estus farinta ĝin per sia peniko.

Sed kiam Suno malaperis malantaŭ la foraj montoj, la koloroj malaperis kaj unue nur la konturoj de la arboj, arbustoj estis videblaj kaj fine ĉion kovris la vualo de la malhelo.

Ankaŭ la vetero ŝanĝiĝis. Malvarme ventis kaj glacia spiro estis sentebla.

Ĉiu vivulo serĉis ŝirmejon, kie la malvarmo estas pli eltenebla.

La arbaro silentiĝis. La pepado de la etaj birdoj plu ne estis aŭdebla. Nur la strigo ululis timige.

Sur la mallarĝa arbara vojeto maljuna viro iraciis lamante. Ĉiu paŝo estis doloriga por li.

Eble ankaŭ li ne sciis, kien li iras. Li nur iris, iradis senhalte. Pro la malhelo li vidis nenion. Ofte la pikoj de la branĉoj de la apudvojaj arbustoj gratvundis lian vangon kaj korpon. Multloke jam sangis la haŭto de liaj brakoj, eĉ la pikaj branĉoj ĉifonigis lian trouzitan mantelon.

Li malsatis kaj soifis. Depost tagoj apenaŭ li manĝis ion. Por estingi la soifon li trovis akvon en rivereto aŭ ĉe fontoj, kiujn li preteriris. Sed nun vespere nenie estis videbla rivereto.

Estus bone ekripozĉi – li pensis, sed li ne volis halti. Li sentis, en la proksimo li trovos vilaĝon. Kelkfoje jam kvazaŭ tra la densaj arbustoj estus viditaj la lumoj de la domoj.

Ĉiam li devis seniluziĝi, ĉar lia imago trompis lin. Vane li iris al la direkto de la vidita lumo, post kelkaj paŝoj li devis vidi, ĝi ne estis lumo. Nur lia imago ludis per ĝi, aŭ ĝi estis la fosforeskantaj okuloj de iu besto, kiu kaŝiĝis inter la arboj.

Li perdis esperon kaj li iris plu. Li sentis fine alvenos en tiun vilaĝon, kie li trovos trankvilon.

La maljunulo jam delonge revadis pri tio. Dum sia vivo li iris tro multe, sed ĝis nun ĉiam lin atendis sufero kaj malĝojo.

Tiu bela, blondulino forlasis lin, kvankam ŝi promesis eternan amon. Ekde tiu tago li vagadis en la vasta mondo serĉante trankvilon kaj forgeson.

Sed kiel forgesi tiujn belegajn blujajn okulojn? Li ne sciis. Ĉe ĉiu vojkruciĝo li esperis, ke tio sukcesos.

Vane alvenis ien, la kara vizaĝo de la junulino ne malaperis, eĉ kiel pasis la jaroj la bildo tiel brulis pli arde en lia koro.

Ŝin forgesi estas neeble. La memoroj torturis lin de jaro al jaro pli bone.

Ne helpis la tempo kaj distanco. Li ĉiutage devis pensi pri ŝi.

Kiam li estis sola en malproksima, senhoma arbaro aŭ kamparo li laŭte ripetadis ŝian nomon, kvazaŭ tio ĉi helpus, kaj la eĥo alportus al li la blondulinon.

Ankaŭ li bone sciis, la pasinta tempo jam neniam revenos. Li devos adiaŭi por ĉiam de sia karulino, kiu jam certe vivas kun alia viro. Ili havas infanojn kaj eble ŝi jam tute forgesis lin. Se tamen ne, tiam en la memoro de la blondulino li estas nur bela memoro.

Tiu ĉi sento estis tre doloriga por li. Ĝi ofte larmigis liajn maljunajn okulojn per kiuj iam admiris ŝin.

— Ho, Dio mia, kial vi forrabis de mi ŝin? – li kutimis diri dum la irado aŭ antaŭ la endormiĝo.

Respondon li ricevis neniam. Se Dio aŭdis lian lamentadon li ne diziris respondi al li.

Lasta forto movigis liajn piedojn. Li apenaŭ povis iri antaŭen. Kvazaŭ ankaŭ la vojo estus fininta. Ĉie estis nur arboj kaj arbustoj.

Kie li estas? – li ne sciis.

Nerveze li serĉis la vojon, kiu kondukas al la trankvilo kaj forgeso.

La malhelo preskaŭ sufokis lin kaj la kapo komencis dolorigi lin.

(— daŭrigota —)



Poezio

Oni festas la Tagon de la Hungara Poezio en Hungario ekde la jaro 1964 la naskiĝdatrevo la 1-an de aprilo 1905 de poeto Attila József. Ĉi okaze oni aranĝas deklamkonkursojn, memorgesperojn, libroprezentadon kaj diversajn renkontiĝojn kun poetoj.

Ofte studentoj aŭ mem la poetoj deklamas siajn versojn.

Multaj poemoj de Attila József estas tradukita al Esperanto. Nun mi elektis por vi kelkajn perlojn.



Attila József

Fine

Kaldronon mi lavis; traĉis herbon;
 kaj mi kuŝis sur putra pajlo;
 juĝist' punis min; stultul' mokis;
 torentis mia bril' el kelo.
 Mi kisis iun, kiu kante
 bakis panon por aliulo.
 Veston ricevis, libron donis
 mi al kampulo, laborulo.
 Bonhavan knabinon mi amis,
 sed sia klaso ŝin forprenis.
 Mi manĝetis nur po du tagoj
 Kaj la stomako malsaniĝis.
 Mi sentis, ke l' mond' estas kirla
 inflama stomako, kaj mukas,
 stomakmalsanas, amo, saĝo,
 kaj milit' estas sangvomado.
 Ĉar acida silent' plenas buŝon,
 Mi batis la koron, ĝi krii!
 Verkema saĝ' ne lasus, ke
 Forgeseblajn kantojn mi skribu.
 Oni donis monon pro l' venĝoj,
 Pop' diris: Filo, flugu al Di'!
 Sed, malhavul' revene devas,
 hakilon, hojon, ŝtonon porti.

Kun kor' brilada, venkopova
 mi estas, do mi devas provi
 fari veron, partion kredi
 je l' supraj severaj memoroj.
 Sed ĉu la memoroj koncernas min?
 Plie mi la krajonon demetas
 kaj akriĝas falĉilan randon,
 ĉar sur la tero maturiĝas
 la tempo, sen zum' kaj timige.

1926 somere / 1930



Kiom bone estus ne rebati

Kiam estas ni batataj grave,
 kiom bone estus ne rebati:
 nek permane, nek pervorte,
 lumi kun taglumo.
 endormiĝi kun la nokto,
 voĉi per la voĉo de malkuraĝo,
 sed neniam rebati.

Mi devus disputi kun miaj animoj,
 kaj nun vivanta estas mi la paco.
 Kristala riverakvo fluadas
 en la vejnoj diamantaj.
 Milda brilo la ĉemizo,
 kaj paco, paco ĉie,
 kvankam nur mi mem vivas per ĝi! ...
 Levas min la sunradioj,
 Dio kisas ĉiujn miajn vizaĝojn,
 kaj grandaj, plenŝarĝitaj ĉaroj ekiras el mi
 al la dezerto.

Szabó Imre



Por infanoj



La koketo de la avinjo

La avinjo havis unu koketon kaj kelkaj kokinojn en la birdokorto. Ili vivis kiel reĝo. Avinjo nutris ilin per bongustaj maizosemoj kaj aliaj. Ili neniam suferis pro la malsato.

Malgraŭ tio la koketo fariĝis malkontenta en iu tago.

Ĝi diris al la kokinoj:

— Mi foriras el tiu ĉi birdokorto. Min interesas, kiel vivas aliaj gekokoj en la malproksimaj landoj.

Iu kokino provis konvinki, ke ĝi ne forlasu la avinjon, ĉar en la mondo ĝin atendos multe da danĝeroj. Ekster la korto loĝas la vulpo, kiu kaptas ĉiun solan kokinon kaj kokon. Restu kun ni! Avinjo baldaŭ portos al ni grandajn maizosemojn. Ĉi tie estas bonega vivo. Ne iru al malproksimaj landoj.

La koketo ne aŭskultis ilin. Kiam la avinjo dormetis en la ĉambro, ĝi iris al la barilo, kie estis truo kaj tie ĝi forlasis la birdokorton.

— Mi estas libera – ĝi kokerikis feliĉe kaj ĝi ekiris.

Ĝi trairis la floran kampon. Tie birdo demandis ĝin.

— Kien vi iras koketo?

— Mi iras al malproksimaj landoj.

— Ve, ne iru tien! Ĉe la arbaro loĝas la vulpo. Ĝi formanĝos vin.



La koketo nur ridis, kiam ĝi ekaŭdis la pepadon de la birdo. Ĝi iris plu.

Dumvoje ĝi renkontis lumbrikon, leporeton, eĉ cikionion, kiuj ĉiuj avertis, ĝi reiru al la birdokorto kaj ĝi ne deziru iri al malproksimaj landoj. Ĝi ĝoju, ke la avinjo zorgos pri ĝi kaj ĉiutage ŝi nutras vin kaj viajn kokinojn.

La koketo ne aŭskultis ilin. Ĝi ridis kaj iris plu.

Baldaŭ ĝi atingis la arbaron. Komence ĉio estis trankvila. Nenie ĝi vidis la vulpon.

Mallarĝa vojeto kondukis tra la arbaro. La koketo eniris la arbaron.

Kiel ĝi iris la arboj kaj arbustoj, tiel iĝis pli densaj kaj en la arbaro estis malhela.



La koketo komencis timi. Ĉie ĝi aŭdis strangajn bruojn. Volonte ĝi jam estus reiranta al la domo de la avinjo, sed ĝi tre hontis, kial ĝi estis malobeema.

Fine ĝi tute konfuziĝis. La vojeto kondukis nenien. Neatendite ĝi finiĝis kaj la koketo trovis sin ĉe la truo de la vulpo.

La vulpo ne estis hejme. Ĝi ĉasadis en la proksima vilaĝo, sed sensukcese.

Ĝi volis ŝteli kokinojn, sed la hundoj rimarkis la neatenditan gaston ĉe la domo.

Ili komencis peli la vulpon. Komenciĝis granda konkurso.

La vulpo provis savi sian felon. Ĝi klopodis kuregi al sia truo, kie ĝi esperis ŝirmadon sub la tero en la truo.

Je la laŭtega bojado ankaŭ la ĉasisto kaptis sian pafilon kaj kuregis post la hundojn.

La pelado daŭris ĝis la hejmo de la vulpo, kie ĝi tuj kaŝis sin subteren. Kiam la hundoj kaj la ĉasisto alvenis ili trovis tie nur la koketon.

La ĉasisto rimarkis:

— Ja, ĝi estas la koketo de la avinjo. Dank' al Dio ni alvenis ĝustatempe.

Ankaŭ la koketo tre ekĝojis al la ĉasisto kaj la hundoj.

Ili reportis la koketon al la avinjo, kiu plurfoje ne volis viziti malproksimajn landojn en la mondo. Ĝi bone fartis ankaŭ en la birdokorto, kie ĝi trovis ĉiam bongustajn maizosemojn.

— Onklo Adalberto —



Humoro

— Mi aŭdis, via bopatrino mortis. Kiom jara ŝi estis?
— Sepdek ok.
— Ĉu mense ŝi estis sana?
— Morgaŭ mi ekscios, kiam oni malfermos la testamenton.

— o —



— o —

Novgeedziĝintoj disputadas. La edzino komencas pakadi kaj ŝi diras:


— Mi reiras al panjo.
— Iru. Mi tre ĝojas.
— Sed mi revenos kun ŝi.

— o —

La bofilo sidante spektas televidon en la ĉambro, kiam la bopatrino venas kun balailo. Li demandas ŝin:

— Ĉu vi deziras balaii aŭ vi veturos ien per ĝi.

— o —



— o —

Policisto staras antaŭ la pordego. Tie elveturas lia bopatrino per biciklo. Li demandas:

— Panjo, kien vi iras?
— Al la tombejo – venas rapide la respondo.
— Kiu reportos hejmen la biciklon?

— o —



Kie estas mia kafo?

Humoro